ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Vierter Jahrgang ★ Nr. 7, Juli 1951



LA LOKOMOTIVO kiu portos vin per 120-horkilometra rapideco al la 36-a Universala en Munkeno

Konciza antaŭ-raporteto prikongresa

Portas min rapidaj radoj
for de l' urb' sur longa vojo;
supre pendas grizaj nuboj,
sed en koro lumas ĝojo.

Mi ja vidos samcelanojn,
brilos nia verda stelo,
aŭdos mi konatajn sonojn —
ĉar Kongreso estas ĉelo.

Bela urbo min akceptos
kaj afabla dommastrino;
bone estas jam zorginta
la estrar' por la gastino.

Ek al konatiĝvespero
en ĉambrego ornamita!
Gajo, ĝojo, amikeco
estos tie ja trovita.

Festdimanĉo de l' malfermo!
Ni kunvenos kun fervoro;
dum aliaj promenados,
nin kunigos la laboro.

Ĉar pri l' bono de l' homaro
ni cerbumas kaj parolas
longe, pace, serioze;
ĉiu nur progreson volas.

Streĉajn, tamen belajn tagojn
finos la naturĝuado.
Spertoriĉaj ni disiros.
Kreskos, floros la movado!

E. Feigenbutz

Die OLYMPIADE 1952 und Esperanto

H. L. EGERRUP · AARHUS

Viele Sportler aus aller Welt werden wahrscheinlich im Jahre 1952 zu den Olympischen Spielen nach Helsinki reisen. Ihnen möchte ich einige Worte über Finnland und die finnische Sprache sagen.

Besucht man ein fremdes Land, so kann man niemals den vollen Nutzen aus seinem Besuch ziehen, wenn man nicht die Muttersprache des betreffenden Landes oder irgendeine andere Sprache, die fast jeder in dem Lande versteht, gut kennt. Nun, die finnische Sprache ist eine schwer erlernbare Sprache, und selbst wenn man Zeit, Geld und Sprachbegabung besitzt, um sie zu lernen, so ist das gar nicht der Mühe wert: denn praktisch verwenden kann man diese Sprache nirgendwo anders als in Finnland selbst.

Die schwedische Sprache wird in Finnland viel gebraucht — gewiß, aber nur in bestimmten Gegenden, wo man sie nicht nur als Unterrichtssprache in den Volksschulen, sondern auch als Kommandosprache für gewisse Regimenter des finnischen Heeres anwendet.

Vor einigen Jahrzehnten kam ein Nationalgefühl über verschiedene Länder in Europa und bewirkte, daß man viele Städtenamen änderte. Damals änderte Finnland nicht nur die Städtenamen, sondern fast die ganze Sprache, in dem Bestreben, die finnische Sprache so viel wie möglich anzuwenden. So kam sprachlich und politisch eine Bewegung gegen das Schwedische auf. —

Da die Verhältnisse nun einmal so liegen, meine ich, wäre es gewiß klug, die Aufmerksamkeit der Sportler in Finnland und im Ausland auf die Tatsache zu lenken, daß es für sie unbedingt notwendig wäre, bei den 1952 in Helsinki stattfindenden Olympischen Spielen Esperanto zu verwenden.

Schon als die Olympiade in Berlin stattfand, verwendete man dort des öfteren Esperanto. denn es gab damals ein Büro, wo alle Auskünfte über die Olympischen Spiele in Esperanto gegeben wurden. Vor dem Beginn der Spiele beantwortete dieses Büro schriftliche und mündliche Anfragen. Auch während der Spiele wandten sich viele Esperantisten an das Büro mit Fragen.

Wenn man bald beginnt, hat man Zeit genug, um das erforderliche Esperanto vor dem Jahre 1952 zu erlernen. Ich selbst habe davon in drei bis vier Monaten so viel gelernt, daß ich einen kurzen Roman, „Frühling im Herbst", lesen und einem Esperanto-Lehrgang folgen konnte, in dem der ganze Unterricht nur in Esperanto war. Ich war damals schon sechzig Jahre alt.

Der Deutsche Esperanto-Bund e. V. (Sitz München-Pasing, Engelbertstraße 7) wird gern allen Sportlern den Weg zur Erlernung des Esperanto weisen.

(Berechtigte Übertragung aus dem Esperanto von Leo Funken. Nachdruck erwünscht.)

Antaŭ 14 jaroj, en 1937

50 JAROJN ESPERANTO

LA ORJUBILEA UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO

Kongresvojaĝo de samideano el „Malpermesitujo" · De W. Ackermann

(Fino)

Sekvintan tagon (merkredo) okazis la pilgrimo al Białystok. Antaŭ la oka horo ni kolektiĝis en la granda halo de la ĉefstacidomo kaj post trihora veturado per rapidvagonaro ni bone alvenis en la menciita urbo. Esperanto-standardo kaj lokaj samideanoj atendis nin sur fervoja perono. Ekster la stacidomo atendis homamaso ĉe afiŝego sur altaj mastoj: „Zamenhofa nasko-urbo salutas vin", kaj orkestro kun bona ludado de la himno. Salutis nin tie la reprezentanto de l' urbestraro per afablaj trafaj vortoj. Dum la enaŭtobusiĝo eksonis gajaj melodioj. Baldaŭ ni atingis la tiel sopire deziratan celon: la naskiĝdomon de D-ro Zamenhof. Ligna, malnova domo, okupita de malriĉuloj. Ligna kurbiĝinta ŝtuparo kondukas al la supra subtegmenta etaĝo en la loĝejon, kie naskiĝis la Majstro la 15-an de decembro 1859. La loĝejo mem estas tre mizera kaj malgranda. Ĝi konsistas el tri ĉambroj, el kiuj la lasta estas eta dormĉambro, kie naskiĝis D-ro Zamenhof. Enskribinte nin en la memorlibron, ni eliras. Sur la domo troviĝas memortabulo kun konforma orlitera surskribo en du lingvoj, pola kaj Esperanta, ornamita per verda stelo. Ĝi estas donacita de l' urbestraro de Bialystok, kaj solene malkovrita dum la unua Internacia Postkongreso Esperantista en la jaro 1927. La strato estas nomita „Zamenhofa" la 11-an de junio 1919. Surstrate oni vidas malriĉegajn, mizeraspektajn, ĉifonvestitajn homojn. En kia malriĉa ĉirkaŭaĵo naskiĝis nia glora Majstro! Sub kiaj malfavoraj cirkonstancoj la bonkora saĝulo ellaboris sian nemorteman verkon! Vidinte tiom da mizero, ĉies koro eksentis doloron, kaj antaŭ ĉies memoro en gloreco ekaperis la granda geniulo, la nekomparebla bonfaranto de la homaro!

La urbestro de Bialystok faris dum la akcepto jenan paroladon en pola lingvo:

„Estimataj gesinjoroj, en la nomo de la urbestraro mi havas la honoron saluti la partoprenantojn de la 29-a Jubilea Kongreso de Esperanto, kiuj bonvolis veni al Bialystok por viziti la naskurbon kaj naskolokon de D-ro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de lingvo por ĉiuj nacioj. Sendube kun emocio vi rigardadis hodiaŭ la modestan kaj malriĉan dometon, en kiu antaŭ 78 jaroj naskiĝis la homo kaj la ideo, kiun vi ĉiuj sekvas. Inspirataj per la nobla ideo de paca alproksimiĝo kaj kunvivado de popoloj, vi portas vian verdan standardon kaj la devizon de disvastigo de la lingvo Esperanto sur la tuta terglobo kaj inter ĉiuj civilizitaj popoloj. Salutante vin mi deziras samtempe, ke la lingvo Esperanto plue sukcesu kaj floru kaj ke vi progresu en via scienca kaj kulturkleriga movado. La tutmonda esperantistaro, reprezentata de la ĉeestantaj tie ĉi delegitoj de ĉiuj nacioj kaj landoj, v i v u!"

Bone organizita estas la afero de la tagmanĝo. Pro la grandnombra vizitantaro diversaj hoteloj estis disponigitaj. Alveninte en la hoteloj ni trovis bele pretigitajn tablojn, sur kiuj eĉ ne mankis manĝokartoj en Esperanta lingvo.

Posttagmeze oni montris al ni kelkajn vidindaĵojn. Interalie estis la knaba gimnazio kiu interesas ĉiun esperantiston pro tio, ke tie lernis siatempe d-ro L. L. Zamenhof. Belaj statuoj ornamas la korton kaj la parkon. — Per aŭtobusoj oni veturigis nin stacidomen, sed kun malfruiĝo. Nia vagonaro estis for, ni okupis la atendejojn kaj ĝojis eĉ pri tiu interrompo uzante ĝin por nin refreŝigi. Kvankam la iom pli poste alveninta vagonaro estis plenplena, ni tamen bone reatingis Varsovion. Vespermanĝinte mi atingis mian loĝejon trame, kiun mi — kiel kongrespartoprenanto — rajtis uzi je rabatita prezo.

Plezuroj kaj laboroj sekvis sin laŭvice kaj tial la ĵaŭdo estis ree labortago por lingva komitato, abstinenculoj, polaj esperantistoj, virina unuiĝo, kristanoj, ĵurnalistoj, komercistoj, kooperativistoj, juristoj, sciencistoj ktp. Ili kunsidis kaj pridiskutis nian aferon en siaj rondoj kaj fakoj.

Intertempe mi vizitis la Jubilean ekspozicion, kie estis montrataj grandampleksa literaturo, la brajla skribsistemo, multegaj afiŝoj, la stadioj de la Esperantomovado kaj multo alia. Specialan atenton meritis la ĉambro dediĉita por la Majstro. En ĝi mi vidis ĉiujn objektojn, inter kiuj ekestiĝis Esperanto. Oni povis ankaŭ konvinkiĝi ke D-ro Zamenhof aplikis Esperanton en sia privata vivo, uzante la lingvon eĉ por plej intimaj aferoj familiaj, aranĝitaj letere. Kun admiro ni eĉ rigardis skribmaŝinon faritan el ligno, konstruitan de nia Majstro. Ĝi prezentas veran inĝenieran produktaĵon.

Vespere okazis „Gaja Vespero" en la granda salono de la kongresejo. Dum ĝi ree kantis la kvar belulinoj el la prezentado en la opero kaj ree ravis la publikon per siaj elokventa kantado kaj gestado. La filmo „Antaŭen", montrita dum la Pariza konferenco, trovis simpatian akcepton kaj dankeman publikon.

Ankaŭ la vendredo servis por prelegoj kaj laborkunsidoj. Ree okazis intertraktoj inter IEL kaj UEA sub la gvido de la filo de nia Majstro Zamenhof en la loĝejo, kie li travivis siajn lastajn tagojn. Sed interkonsento ne povis esti atingata.

La vendreda vespero estas kutime la brilpunkto inter la amuzaĵoj de la kongreso. Tiam okazas la internacia balo, dum kiu montriĝas la diversaj naciaj kostumoj kaj la dancemo de iliaj portantoj. La feste ornamitaj salonoj de la urbdomo akceptis la balantan kongreson. Jen ni vidas ĉarmajn svedinojn en diversregionaj kostumoj naciaj, jen estas nederlandaninoj, estoninoj, finnlandaninoj, kaj ĉiaj aliaj — sed ĉefan atenton altiras ĉarma, nacivestita japanino akompanata de nia samideano Prof. Yagi, vestita en bela silka nigra kostumo de samurajo. Li ricevis la unuan premion pro la plej bela kostumo. La suno jam leviĝis kiam oni per droŝko veturis hejmen.

(14. 8.) Horeton dorminte oni devis rapidi por esti ĝustatempe en la ferma kunsido. Ĉi tiu kunsido jam portas en si la senton de la adiaŭo de ĉiuj geamikoj novaj kaj malnovaj, kiujn oni trovis dum la kongreso. Fadenoj ligiĝis denove trans landojn kaj limojn kaj kuntenas la malgrandan, sed tamen tutmondan popolon de la esperantistaro.

Post kiam Prof. Buywid estis ferminta la kunsidon, D-ro Adam Zamenhof prenis la parolon por raporti pri rezultoj de la unueciga laboro inter IEL kaj UEA. Oni parolis pri diversaj aliaj decidoj. Prof. Buywid dankis ĉiujn helpantojn kaj deklaris la kongreson fermita, kaj la ĉeestantoj ekkantis la „Esperon". Posttagmeze kelkdeko da kongresanoj partoprenis duhoran promenon per ŝipo sur la Vistulo, kaj vespere oni denove renkontiĝis en Kafejo Bagatelo por diri adiaŭ. Parto de la kongresanoj forlasis Varsovion sabaton matene, aliaj vespere, kelkiuj restis por dimanĉo aŭ eĉ lundo. Ili disiris en la tutan mondon: Amerikon, Afrikon, Azion, Aŭstralion.

Jes, mi ankaŭ devis forlasi la kongresurbon kaj kun la intenco uzi vagonaron dimanĉon matene ĉirkaŭ je la naŭa, mi veturis sufiĉe frue stacidomen. Ho bela surprizo, mia kongresamikino staris antaŭ la stacidomo kun bela florbukedo en la mano atendante min. La tempo rapide forpasis, kaj la voko „envagoniĝu" disigis nin. Mi svingis la florojn, dum la vagonaro forlasis la halon. Nun mi povis konstati, kompreneble kun granda ĝojo, ke en la vagonaro troviĝis multege da esperantistoj, kaj ĝis Berlino mi restadis en Esperantujo. Vere kontentiga fino de la kongreso.

Saluton al la EP-anoj en Munkeno!

El la stabo de EP 1-roj BERGER kaj GOPPEL partoprenos la 36-an. Ili ĝojos tie renkonti grandan aron el la estimata legantaro de EP.

Neuigkeiten aus der Esperanto-Bewegung

Achtzehnhundert Anmeldungen aus vierunddreißig Ländern

Über achtzehnhundert Teilnehmer aus vierunddreißig Ländern haben sich bereits zum 36. Esperanto-Weltkongreß angemeldet, der unter der Schirmherrschaft von Kultusminister Dr. Josef Schwalber vom 4.—11. Aug. in der Ludwig-Maximilian-Universität zu München stattfindet.

Auch Japan wird vertreten sein

Zum ersten Male nach dem Kriege wird wieder eine japanische Delegation an dem Esperanto-Weltkongreß teilnehmen. Das Münchener Kongreß-Komitee erwartet einen offiziellen Vertreter der japanischen Regierung.

Bayrische Persönlichkeiten im Ehren-Komitee

Die folgenden bayrischen Persönlichkeiten haben bisher ihren Eintritt in das Ehren-Komitee des 36. Esperanto-Weltkongresses erklärt und ihre positive Einstellung zum Esperanto bekundet: Dr. Friedrich Kneuer, Regierungspräsident von Oberbayern; Thomas Wimmer, Oberbürgermeister von München; Ministerialdirigent Dr. Karl Schwend, Bayrische Staatskanzlei; Prof. Dr. h. c. Hans Ludwig Held, Beauftragter für Kultur der Stadt München; Präsident Dr. Heinrich Weichner, Oberpostdirektion München; Präsident Josef Grüner, Eisenbahndirektion München; Dr. Josef Singer, Präsident des bayrischen Senats.

Sozialisten-Kongreß in Stockholm

Vierhundertfünfzig sozialistische Esperanto-Delegierte aus vierzehn Ländern werden an dem 24. Kongreß der „Übernationalen Weltvereinigung SAT" in Stockholm vom 28. Juli bis 3. August teilnehmen. Der Oberstadtdirektor von Düsseldorf hat den 25. SAT-Kongreß für 1952 nach Düsseldorf eingeladen.

Neunsprachiges etymologisches Lexikon

Die zweite, erweiterte Ausgabe des „Naŭlingva Etimologia Leksikono" von Louis Bastien ist jetzt erschienen. Ein Vergleich mit acht bedeutenden Kultursprachen (lateinisch, französisch, italienisch, spanisch, portugiesisch, deutsch, englisch und russisch) zeigt deutlich, daß der Wortschatz der internationalen Sprache Esperanto nicht willkürlich zusammengestellt, sondern diesen Sprachen entnommen wurde.

Achtundzwanzigtausend Esperanto-Buchtitel

Die Bibliothek des Britischen Esperanto-Bundes, die 1922 gegründet wurde, umfaßt jetzt bereits 28 060 Titel. Die Werke, die größtenteils in Esperanto abgefaßt sind, behandeln Themen aus allen Wissensgebieten. Ihre Nummern entsprechen dem Dezimal-Klassifikations-System von Dewey und geben zugleich über den Inhalt jedes Werkes Aufschluß.

Jugendliche fahren nach Jugoslawien

Eine Reihe Jugendlicher aus der Bundesrepublik wird auf Einladung der jugoslawischen Regierung am Bau der „3. Jugend-Eisenbahnlinie" in Bosnien mithelfen. Die Jugendlichen werden vier Wochen dort arbeiten und anschließend an einer einmonatigen Studienreise durch ganz Jugoslawien teilnehmen. Alle Kosten innerhalb Jugoslawien trägt die dortige Regierung; die Teilnehmer müssen Esperanto beherrschen.

Eisenbahner-Esperantisten in Paris

In Paris fand vom 16.—20. Mai der Dritte Internationale Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten statt. An dem Kongreß nahm eine starke Delegation der Bundesbahn teil.

Französischer Minister für Kulturfortschritt

Der französische Unterrichtsminister hat die ihm unterstellten Schulinspektoren und Rektoren erneut auf den Erlaß vom 11. Oktober 1938 hingewiesen, wonach es wünschenswert erscheint, die Ausbreitung des Esperanto-Unterrichtes zu erleichtern. Minister P. O. Lapie schrieb vor kurzem: „Meine vollste Sympathie gehört den Esperantisten!" Albert Chatelet, Dekan an der Pariser Universität, erklärte in einem Interview, daß er nach wie vor die Einführung des Esperanto an Universitäten und Höheren Schulen befürworte, um einen wesentlichen Kulturfortschritt zu ermöglichen. Der Direktor des französischen Fernsehprogramms, Jean Luc, betont die Eignung dieser Sprache in jeder Hinsicht für den Funk.

Esperanto-Straße jetzt auch in Hannover

Der Verwaltungsausschuß des Rates von Hannover hat beschlossen, einer Straße den Namen „Esperantostraße" zu geben, „um einen oft geäußerten Wunsch nach Anerkennung der internationalen Sprache auch im Straßenbild zu erfüllen".

Guttempler fordern Esperanto

Die Internationale Groß-Loge der „Guttempler" wurde von ihren Mitgliedern in Finnland aufgefordert, als Konferenz- und Korrespondenzsprache Esperanto zu gebrauchen.

La 23-a IKKE

Al la 23-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj aliĝis ĝis 8-6-1951 110 personoj el 11 landoj. Lia episkopa moŝto D-ro Johann Neuhäusler, helpepiskopo de la ĉefdiocezo München-Freising, transprenis la honoran protektantecon super la 23-a IKKE.

Sur tiu ĉi paĝo: La lastaj sciigoj pri la 36-a Universala:

Munkeno salutas vin!

München bereitet sich auf den Empfang von achtzehnhundert Esperantisten aus vierunddreißig Ländern vor, die Anfang August in der süddeutschen Metropole ihren 36. Esperanto-Weltkongreß abhalten. „Munkeno salutas vin!" heißt der Titel des neuen Werbeprospektes von München, der nun auch in Esperanto vorliegt.

„Esperanto-Platz" in München

In seiner letzten Sitzung hat der Münchner Stadtrat beschlossen, einer verkehrsreichen Kreuzung am Fuße der Bavaria den Namen „Esperanto-Platz" zu geben.

Internationale Sommer-Universität

Der Rektor der Münchner Universität, Prof. Dr. Michael Schmaus, hat das Ehrenprotektorat über die „Internacia Somera Universitato" übernommen, deren vierte Arbeitsperiode am 5. August in den Räumen der Ludwig-Maximilian-Universität eröffnet wird. Vor etwa siebenhundert Hörern aus dreißig Ländern werden neun Wissenschaftler von internationalem Rang Vorlesungen über Euthanasie, Molekular-Physik, Literatur und Musik, sowie über andere Themen halten. Prof. Dr. Ivo Lapenna aus Paris, der die Sommer-Universität in München vorbereitet, erklärte, daß man diese Sommer-Universität, deren Vorlesungen ausschließlich in Esperanto gehalten werden, zu einer festen Einrichtung mit dem Sitz in Brügge oder in Den Haag machen wolle oder sie an die Pariser Sorbonne legen werde.

Internationales Jugendlager

Gleich im Anschluß an den 36. Esperanto-Weltkongreß in München wird vom 11.—17. August in „Deutschlands schönster Jugendherberge" Urfeld am Walchensee ein internationales Jugendlager veranstaltet, zu dem über 70 esperantokundige Jugendliche aus ganz Europa erwartet werden.

Estu bonvena en Limburg!

Ni tre ĝojus saluti multajn samideanojn en nia eldonejo en Limburg. Post la 15-a de Aŭgusto, la eldonanto ree estos hejme en Limburg. Haltu travojagante!

Solvo de la traduk-tasko 19

(El n-ro 5, 1951)

„Kölnische Rundschau" (Kolonja Revuo) de 23 Marto [1])

Usona aeroplanego forrestinta [2])

Verŝajne [3]) dum ventego [4]) faleginta [5]) en la maron — Aeroplanoj de tri nacioj serĉadas ĝis nun vane [6])

Londono, 23 Marto. (ap) Transport-aeroplanego [7]) de la usona aerarmeo [8]), tipo [9]) „Globemaster II", estas forrestinta [10]) super la Atlantiko [11]) de [12]) vendredo matene. Sav-aeroplanoj [13]) de tri nacioj, (nome) Usono, Irlando kaj Granda Britujo, tuj komencis la serĉadon je [14]) la malaperinta flugmaŝino, kiu verŝajne falegis en la ondegantan [15]) oceanon [16]) inter Islando kaj Granda Britujo.

En la maŝino, kiu estis fluganta [17]) de Limestone (Maine) al Mildenhall en Anglujo, troviĝis inkluzive de la ekipa personaro [18]) 53 anoj de la usonaj aermilit-fortoj, inter ili (unu) [19]) brigado-generalo [20]).

Laŭ la lasta lok-informo [21]) la aviadilo troviĝis sur la linio Novlando [22]) — Anglujo en distanco de ankoraŭ proksimume [23]) 1300 km (for) de la Irlanda marbordo. La piloto raportis [24]) ke, pro [25]) la ventego kaj nebulo, li alvenos antaŭvideble kun malfru(iĝ)o de 40 minutoj [26]) en Mildenhall. La lasta radiosciigo [27]) estis ricevata je la 2a matene. De la 7a la aeroplano estas anoncita kiel trans-templima [28]). Car [29]) ĉiu „Globemaster"-maŝino disponas [30]) pri [31]) pneŭmatikaj [32]) savboatoj kun enmuntitaj ujoj por akvo kaj nutraĵoj [33]), restas ankoraŭ (la) espero, ke la aviadilanoj [34]) povos esti savataj [35]).

Bemerkungen zur Übersetzung

Wie schon erwähnt, war sie nicht ganz leicht. Trotzdem haben sich im ganzen 31 EP-Leser darangewagt, darunter — alle Achtung! — ein 82jähriger und ein 87jähriger Samideano! Die beste Arbeit herauszufinden war schwierig. Der eine hatte dies, der andere das besser getroffen. Preiswürdig waren 10 Arbeiten, aus denen nach genauem Abwägen folgende Preisträger hervorgingen:

1. **Preis: H. Fries, Bensheim (Vortaro de Christaller),**
2. **Preis: W. Klünder, Burgsteinfurt (Jarkolekto de EP 1950),**
3. **Preis: Fr. Jodozi, Düren (Esperanto in der Tasche.**

Wir beglückwünschen sie, danken aber auch all den andern, die sich beteiligten, für ihr Interesse. Vielleicht bringt auch ihnen schon die nächste Preis-Übersetzungsaufgabe einen Gewinn.

Erfreulich ist, daß anscheinend auch ganze Gruppen (z. B. Burgsteinfurt) an dieser guten Übung teilgenommen haben. Dies möge ein Ansporn auch für andere Gruppen sein.

Die Übersetzung im einzelnen durchzugehen, wird sicher auch denen von Nutzen sein, die sich nicht an der Übertragung beteiligten. Zu erstreben ist stets eine möglichst wortgetreue Übersetzung in korrektes Esperanto. Das soll nicht heißen, daß man pedantisch übersetze; man gehe Schwierigkeiten aber auch nicht großzügig durch Umschreibungen aus dem Wege.

1. „Kölnische Rundschau" bleibt am besten unübersetzt. Es empfiehlt sich jedoch, in Klammern den Titel auch in Esperanto zu bringen.

Wie man das Datum schreibt, ist nicht genormt. Jedenfalls bedeutet in Esperanto ein Punkt hinter einer Zahl nicht, daß sie damit eine Ordnungszahl geworden ist. Ganz korrekt ist: 23an de Marto. Journalistische Kürze empfiehlt vielleicht die Schreibung: 23 Marto.

2. Amerika und Usona sind natürlich nicht gleichbedeutend. — Aviadilo ist jedes Luftfahrzeug, also auch z. B. ein Luftschiff; aeroplano = Flugzeug (Unterbegriff). Verwendet man aber einmal das eine Wort für das andere, so ist das wohl kein Fehler.

Das Wort „vermißt" hat außer obiger Übersetzung noch folgende ergeben: malaperinta, mankanta, perdiĝinta, netrovita, (for)mankas, ne alvenis, ne revenis. Misita (vom inoffiziellen Präfix mis-) ergibt nicht die verlangte Bedeutung. (Vgl. miskompreni = mißverstehen, misrikolto = Mißernte, misaŭdi = sich verhören.)

3. auch: supozeble, probable.
4. auch: uragano, tempesto, ŝtormo.
5. auch: ĵetita; jedoch fragt man hierbei unwillkürlich: von wem?
6. auch: senrezulte, sensukcese.
7. auch: giganta transport(ŝarĝ)aeroplano. Bandwurmwörter wie ganttransportaviadilo vermeide man tunlichst.
8. auch mit -fortoj, dann aber besser unter Hinzufügung von milit: aermilitfortoj.
9. oder: de la, laŭ la tipo.
10. siehe unter 2, zweiter Absatz.
11. auch: Atlantika Oceano.
12. noch schärfer: ek de.
13. auch: porsavaj aeroplanoj.
14. obwohl die meisten pri, auch pro, al, schrieben, scheint hier das unbestimmtere je besser am Platze.
15. auch: ventegan, tempestan, furiozan, tumultan, malkvietegan.
16. maro: Meer; die See = la oceano.
17. auch: kiu aviadis, kiu estis surfluge.
18. auch: teknika anaro, servo-personaro, aeroplanistoj.
19. unu kann auch wegbleiben, wenn man die Anzahl nicht betonen will.
20. brigadestro.
21. ebenso gut: pozici-raporto; situoraporto, priloka r., pripozicia sciigo.
22. Novlando wohl besser als Nova-Tero, das geeigneter für „Novaja Zemlja" (Doppelinsel in der Arktis) zu sein scheint.
23. rondnombre, ĉirkaŭ.
24. informis, komunikis.
25. auch: kaŭze de.
26. auch: kvardekminuta malfruiĝo.
27. auch: radiogramo, radio-komuniko.
28. die weiteren Lösungen: ne veninta ĝustatempe, tromalfruiĝinta, perdiĝinta, supertempa, netrovita, akcident-suspekta, prokrastita entsprechen alle nicht oder nur annähernd dem Wort „überfällig".
29. pro tio ke; die Redaktion zieht vor, ĉar mehr für denn, franz. car, lat. nam, also als beiordnendes Verbindungswort, zu gebrauchen.
30. havas, posedas.
31. oder je oder bloßen vierten Fall.
32. auch: gumtubaj savboatoj, porsavaj kaŭĉukboatoj.
33. auch: instalitaj akvujoj kaj nutraĵujoj, enkonstruitaj akvo kaj nutraj-kameroj, — ĉeloj.
34. anoj de la a., auch ensidantoj, enmaŝinuloj, okupantoj, pasaĝeroj.
35. auch: estas saveblaj, saviĝos.

La ĉi-supra traduko baziĝas ĉefe sur la tradukoj de H. Wingen kaj J. Berger (ekster konkurso).

Postler, lernt Esperanto!

Die Post ist eine international arbeitende Einrichtung. Den deutschen Postlern ist es zu wenig bewußt, daß sie als Glieder dieser weltverbindenden Organisation auch in sprachlicher Hinsicht mehr beitragen können, um im Weltmaßstabe für schnellere und bessere Zusammenarbeit mit Postlern aller Länder zu werben. Neben Erlernung der nationalen Sprachen ist es von größtem Vorteil, auch Esperanto zu erlernen und praktisch zu benutzen. Eine Esperanto-Sektion des DEB. für Postler ist gegründet worden, um diesen Gedanken zu verwirklichen.

Jeder Postler, der fortschrittlich denkt, wird den großen Nutzen von Esperanto kennen lernen, wenn er durch diese universale Sprache Freunde, Kollegen und Gleichgesinnte in allen Ländern findet, mit denen er schriftlich und persönlich in einer Sprache in Kontakt kommt. Der Nutzen sowohl für sich und seine Berufskollegen als auch für die gesamte Post ist leicht zu erkennen, sobald man erst einmal die Idee und ihre Konsequenz kennengelernt hat.

B. Siegert

Die EP-Rakete

Schon wieder hat die EP-Rakete eine Panne gehabt. Auf ihrer Zwischenlandung in Italien ist sie liegengeblieben. Wie wir in Nr. 4 S. 46 hörten, flog sie von Norwegens Hauptstadt unter Hilfestellung der S-anoj Rosbach und Støp-Bowitz nach dem Freistaat Triest und wurde dort von S-ano Marini schnell und liebevoll betreut. (Bei unserer Rakete darf man so sagen.) Aber am nächsten Ziel in Parma, Italien, haben sie widrige Umstände länger als nötig festgehalten. Doch jetzt ist sie wieder flott und hat bereits ihren Weiterflug von Valencia, Spanien (Dr. R. Herrero) nach den Kanarischen Inseln angetreten. Hoffentlich bringt sie die verlorene Zeit durch doppelte Schnelligkeit wieder ein.

LA BOFRATO

Japana legendo · Originale de Petra Kalt · Traduko de Emmy Thiel

Rapide kaj ne rimarkate, ŝi volis mortforigi sin. Per malbrua katpaŝo, sed tre rapide ŝi jam trakuris tri, kvar ĉambrojn; ŝi nun devis ĉirkaŭiri angulon, kaj la unua, ne la dua pordo kondukis al oficejo de ŝia patro. Tie li sidas por la skribado de la firmlibroj; sed je tiu momento oni apenaŭ supozas renkonti lin. Ŝi restis staranta ĉe la pordo, paralizate de ektimo, kiam ne atendinte ŝi ekvidis lin. Ŝi troviĝis vizaĝe al sia bona, arde amata patro. Spiritprete ŝi ankoraŭ fermŝovis la pordon malantaŭ si kaj malkonsterniĝis tiamaniere, ke ŝi povis forigi la angoroplenan timon. Ĝis ĉi tie, ĝis loko, konsekrita al la patro, ŝi estis rifuĝinta. Kio nun? Ĉu ŝia intenco daŭros? Ŝi estis ne nur lia tre kara intimulino, sed ankaŭ lia negoca konfidenculino, kaj pro tio ŝi ĉiam rajtas eniri lian sanktejon.

„Mia patro, lumo de mia vivo! Mi faris malprudentaĵon, vendinte tro malkare. Ĉu vi volas kontroli la negocon?"

„Venu al mi, mia infano, floro ĝojiganta la okulojn, estu sincera! Malŝarĝu la koron kaj konfesu la okazaĵon. Mi konas vin, vi estas tute la mia, kaj ĉiu emocio de via animo estas rimarkata de mi. Ne estas la vendo, eĉ de mia plej bela ekzemplero de kimono, kiu puŝas vin al mi; viaj okuloj neniam rigardis min tiel grandaj kaj timplenaj."

„Vi estas tro bona al mi, mia vivdonacinto" ŝi aldiris mallaŭte. „Mi sciâs, ke vi vidis min neniam tiel ekscitita. Min kaptas kapturno, permesu, ke mi enlitiĝu, kaj vi ekscios ĉion je plej proksima okazo."

„Via ripozo estu benata! Mi akompanos vin al via ĉambro", diris zorgeme la patro multsignife kaj rigardis sian asistantinon kaj helpantinon, en kies animo ventego furiozanta ne volis trankviliĝi.

Li estis for, li eliris ŝian ĉambreton, post kiam li ordonis ŝin enlitigi sin, karesetante delikate ŝian frunton kaj ŝiajn harojn. Ambaŭ manojn ŝi metis antaŭ sian vizaĝon. Ŝi deziris, ke la tero malfermiĝu kaj englutu ŝin. Ŝi volus suferi tion mute. Ŝia projekto malsukcesis. Ŝi ne plu povis fari sinmortigon. La patro komprenis ŝian intencon. Certe li forprenis la ponardon intertempe. Esplori tion ne taŭgos; survoje tien ŝi certe renkontus sian fratinon. Ke per tiu renkonto ŝi povus perdi la vivon, tio ne emociigis ŝin, ŝi eĉ deziris tion; sed la fratino ne devus kulpiĝi pro ŝi, kiel ŝi mem kulpiĝis pro la fratino.

Rapidege ŝi prenis tie kaj tie kelkajn utilajn aŭ neutilajn ajojn, metis ilin en saketon, pendigis ĝin je la brako, supreniris tra la truo de la fenestro, kies vitraĵo nun dum somero estis forprenita, kaj ŝi troviĝis ekstere de la domo. Fuĝeme ŝi forkuris en iu ajn direkto. Ŝi trotetis tiel rapide kiel ŝiaj malgrandaj piedoj permesis, kaj ŝi ne plu returne rigardis. Nur for! Nur foriri! Pli rapidege ŝi volis ankoraŭ forkuri, sed la ideo mem de la rapideco multe malhelpis la funkcion de ŝiaj spir- kaj mov-organoj, kaj premis ŝin kiel bruliganta plumbo. Ĉu la forkuro sukcesos, ĉu ne, ŝi ne volis plu vivi sub tiu ŝarĝo. Ĝi pezis sur ŝi, kien ajn ŝi turnis sin. Forpelate de la arda deziro fariĝi libera de sia kulpo, ŝi serĉis la lokon, kie ŝi esperas trovi suferĉeson. Sen hejmo, sen patro, tute sola ŝi volos plenumi la punjuĝon. Nenia kompato rajtas malsekigi homan okulon pro ŝi. Tion ŝi ne meritas. Nur kiam la gamboj rifuzis la servon, ŝi sidiĝis iuloke kaj turmentis sian cerbon pri la okazaĵo.

Ĉe la unuiĝinta rondo, kiam la bofrato estis akceptata kiel estonta membro de la familio, ĉe la festa trinkado, ŝi rigardis trans la randon de pelvo per sakeo plenigitan la estontan bofraton. Lia rigardo penetris pli profunde, pli bruligante, pli longtempe la ŝian ol la okulojn de lia fianĉino kaj estonta edzino.

Ege subite tiam la virineco ekvekiĝis en ŝi. Tiu vekiĝo faris ŝin timema; ĝi serĉis sekrete la personon de la vekanto; sed tiu ja estis la nedividebla posedaĵo de ŝia fratino. Ŝi ne intencis fali en tiujn konfliktojn. Ŝajnas, ke li scias pri ŝia konfuzo; li ne estimis ĝin, sed grandigis ĝin. Kie li renkontis ŝin sola, li kaptis ŝian manon, levis ŝian mentonon, por devigi ŝin alrigardi lin. Li eĉ celis premi sin proksime al ŝi, eĉ en la ĉeesto de la fratino, honori ŝin pli ol la fratinon, kiu devus esti lia suno. Malama rigardo de la fratino ofte sekvis ŝin de tiam; pro tio ŝi sentis sin ĝenata. Ne ĉe T a i r e, sed ĉe ŝi mem, la fratino serĉis la kulpon. Kolereme ŝi ne suferis kviete la ĉagrenon; ŝi malbenis ŝin, minacis mortigi ŝin, se ŝi ŝtelus la amon de la viro.

Hodiaŭ, ĉe la vendo de la feinda, bela kimono, la plej bela ekzemplero de ŝia elektaĵo, T a i r e volis instigi ŝin, gardi ĝin por si mem; ĝi povu fariĝi ŝia robo de fianĉino; iliaj okuloj senkonsciaj pri si mem, rigardis unu la alian, ĝis la fratino venis kun aĉetantino. Per trorapideco, kiu montris, ke ŝi estas konscia pri sia kulpo, ŝi decidigis la aĉetantinon je aĉeto; kiam tiu konsideris la prezon tro alta, ŝi fordonis la kimonon multe sub valoro. A m a j u sciis pro kio! Kiam ŝi, K l i j o r i, jam riverencis antaŭ la aĉetintino kaj la fratino adiaŭis tiun, la malbonaj okuloj de Amaju postrigardis ŝin. Por trompi ŝin, ŝi trakuris kelkajn ĉambrojn, sed ŝia celo estis atingi la patran privat-kontoron; ŝi intencis preni la malgrandan, akran ponardon el la kesto kaj puŝi profunde en la maldekstran brustflankon. La ĉeesto de la patro malhelpis tion.

La plej romantika el la germanaj romantikaj noveloj de Joseph von Eichendorff aperos ek de la aŭgusta numero en Esperanto-Post kun la titolo

El la vivo de netaŭgulo

La traduko de Paul Bennemann meritas ĉies atenton kaj certe respegulas la originalan tekston en eleganta kaj tiutempa stilo. Vi certe ĝojos dum la legado! Ni deziras al niaj estimataj gelegantoj grandan ĝuon!

REDAKCIO KAJ ELDONEJO

Denove ŝi metis la kapon inter siajn kavajn manojn kaj ĝemplendis profunde. Rigardante ĉirkaŭe, ŝi pensis ke ŝi ne rajtas resti, nek ripozi. Turmentate ŝi devos rapidegi, nenie kaj neniam ĝui trankvilan momenton. Kion la patro estos diranta, kiam frumatene ŝi ne estos trovebla: neniu el ŝiaj pensoj okupiĝis pri tio; kiun ĉagrenon ŝi faris al li, kion ŝi forrabis de li kaj ankaŭ la certecon neniam revidi lin, tion ŝi ne pripensis. Kiel flugetanta birdo en vitro-kesto, ŝiaj pensoj nur cirkle turniĝis ĉirkaŭ la ununura penso: ŝia kulpo.

Laŭ ŝia propra impulso, tiu kulpo jam estus pentofarita, se la patro ne estus intermetinta sin, formante ŝian destinon kaj malhelpante ŝian mortigon. Nur la dioj nun povos kaj rajtos decidi.

Ŝi nun troviĝis survoje al la dioj. Sed tiu vojo estis longa, malglata, kaj sen konsolo. Ŝi devis migri nordoriente tien, kie la dioj ŝin jam nun atendas. Ne nur per siaj piedoj, kiuj facile laciĝis, nekutimigitaj al penoj, ŝi devos atingi la celon, sed ankaŭ pene sin nutri per laboro de siaj manoj.

Kelkajn tagojn da vojdistancoj ŝi havis malantaŭ si; distancoj metitaj inter la patra domo kaj ŝi! Tiam ŝi frapis morte laca kaj timema al pordo de mizera kabano. Ŝi scias ke, kie malriĉeco loĝas, tie vi trovos helpon, ĉar mizero konas kompaton. Ŝi petis pro pelvo da rizo, kaj pro permeso bani siajn dolorantajn piedojn. Du maljunaj geedzoj bonvenigis ŝin. Iliaj infanoj geedziĝis, kaj pro tio la geedzoj nun vivis denove solaj dum siaj fintagoj. Klijori diris al ili, ke ŝi estas iranta pilgrime.

„Restu, kaj ripozu tiel longe, kiel vi volas", diris O'sen, la maljunulino. Sed ripzozi, tion Klijori ne volis.

„Monon por la vojaĝo mi bedaŭrinde ne povas doni al vi; nian malgrandan domon kiel azilon, partoprenon en nia manĝo ni volonte oferas al vi", diris O'sen.

„Plezure, bona O'sen, mi akceptus vian proponon, sed kiel mi iam povus repagi vin? Ankaŭ mi devas gajni monon per miaj du manoj, por ke mi povu atingi la celon de miaj deziroj."

„Por tio mi ankaŭ trovos rimedon. Ekzistas silkfabrikejo ĉi tie, kie mia edzo laboris antaŭe. Li povas tie demandi pro vi."

Klijori nun staradis dum horoj ĉe teksilo, kaj inter ŝiaj diligentaj manoj fariĝis el implikitaj fadenoj bela, glata teksaĵo. Ŝi eklernis la penigan laboron, per kiu estiĝas tiel belaj vestaĵoj, kiajn ŝi vendis tiel rapide kaj senpripense. Tiamaniere ŝi volis sin tiri el embaraso, kiel ŝi opiniis, sed nur des pli ŝi implikiĝis. La laboro ne lasis al ŝi liberecon primediti longtempe sian malfeliĉon.

Frumatene, sur vojo al la fabrikejo, ŝi memoris sian patron, kiu nun certe sidas sola en sia kontoro kaj dolore pensadas pri ŝi. Ŝi sentis pikon tie, kie ponardo devus trafi ŝin. La ŝiaj kredus ŝin morta kaj ne funebrus pri ŝi tro profunde. Vespere, kiam ŝiaj piedoj estis tute rigidiĝintaj kaj ŝi mem treege lacigita, ŝi helpis Otan, sian gastiganton, ĉe la kulturado de la silk-raŭpoj. Estas la tempo de ilia matureco, antaŭ la kolekto de la kokonoj. Tiam la ŝpinantoj bezonas vartadon. Ŝi jam lernis kiamaniere oni ekkonas frue malsanecon en ili, kiel oni ekscias la malsanajn kaj forjetas ilin. Ĉiun tagon oni ŝanĝis la kuŝejon kaj alportis foliojn de moruso al tiuj, al aliaj foliojn de kverko.

Je la tempo de la festo de ĉerizflorado ŝi eliris la patran domon kaj komencis pilgrimadon. Nun la elmontro de glicinioj jam de longe estis pasinta. Oni alproksimiĝis al la fino de la jaro, kaj si devis pripensi la daŭrigon de sia vojo. Longa ĝi estos ankoraŭ kaj peniga, tion ŝi antaŭvidis.

Dolore ŝi eliris la gasteman kabanon, adiaŭinte ties loĝantojn. Ŝi iris antaŭen, orienten, iom nordan direkton. Tiamaniere ŝi devos atingi tiun lokon, kie ŝia sorto decidiĝos.

Baldaŭ ŝia mono malestiĝis, ŝiaj gajnitaj kaj ŝparitaj moneroj elspeziĝis antaŭ ol la celo estis atingita. Klijori vidis sin denove devigita serĉi laboreblecon.

Modesta, simpla, kia ŝi estis, lerta pri ĉiu faro, ŝi baldaŭ trovis okupiĝon, profundiĝante en ĝin tiamaniere, kvazaŭ ĝi estus laborakiro por la tuta vivo.

Ekzemploj por presdesegno kaj brodaĵoj estiĝis sub ŝiaj arte formigantaj manoj.

Tiu laboro faris ĝojon al ŝi mem, tiel ŝi ĉiam bedaŭris, kiam la horoj de la tago pasis kaj ŝi devis flanken meti ĝin. Ne sen sukceso estiĝis ŝia migrado tra longaj distancoj, kiam ŝi pasis ŝoseojn, ebenaĵojn, montarojn, kiujn ŝi vidis en la klareco de la leviĝanta kaj malleviĝanta suno.

Ŝi vidis tion nek per apatiaj, nek per indiferentaj sentoj. Multo encerbiĝis al ŝi nekonscie. La temoj prezentiĝis al ŝi senpere. Unue en la naturo, tio kion la dioj donacis al homoj por ilia daŭrigo: kie la gokoku plenigas la pejzaĝon kvadrate aŭ horizontale: kie la vento pasas super ondaj tritiko-kampoj, kie rizo staras, milio kaj fazeoloj floras. Kie kano kreskas, palmoj donas ombrojn, cikadoj kaj cipresoj borderas la vojon.

De la plej modesta floreto ĝis okultranĉa papavo kaj strangaj floroj, ili ĉiuj kuniĝis inter ŝiaj manoj, ĉu ili kunapartenas aŭ ne, per koloroj, kiuj paligis tropikajn papiliojn, aŭ hontigis paŝtelon de la plej delikata desegnaĵo. Tiel tio, kion ŝi vidis per atentaj okuloj pri la beleco de la pejzaĝo kaj ties riĉeco: la aperaĵoj de la mondo nun brilegis alimaniere, tute alimaniere, ordigitaj de homaj manoj sur ĉiuj specoj de teksaĵoj: kiran, aya, ĝis nishiki-kotono. Orbrokato estis rezervata por la omi.

En sia patra vendejo ŝi vendis iam sambelajn damaskojn. Ĉu nun unu el ŝiaj desegnaĵoj hazarde falis en iliajn manojn?

La vivo de Klijori estis zorgoplena. Sia ekzisto postulis gajnon de mono, kaj la efektivigo de ŝia intenco bezonigis ankaŭ monon.

La ke, kie ŝi tiufoje trovis rifuĝejon, ne estis la gastema azilo de O'san kaj Ota; tie loĝis iu miyakko. Li estis ruza kaj inteligenta. Li havis solan filinon, kiu estis gejŝo en unu el la plej elegantaj teejoj. Li sendis ŝin tien por gajni monon; li pensis ke iu enamiĝos al la stranga super-etera knabino, kaj deziros ŝin kiel edzinon, iu, kiu estas sufiĉe riĉa por aldoni al ŝi la kadron, kiun ŝi deziras al si. (Finota.)

Tiam

Kiam ni estis junaj,
En tiuj noktoj lunaj
Ni kantis, amis, festis:
Rave-belege estis!

Ho jes! La brila vino,
Enbrake belknabino
Cielaj donoj estas...
— Ne longe belo restas!

Damals

Der Jugend denkt mit rechten,
Wie in den Mondscheinnächten
Wir sangen, liebten festlich:
Wie schön das war, wie köstlich!

Ach ja! Beim klaren Weine
Und in dem Arm die Meine —
Mir schien's des Himmels Gnade...
— Wie bald vorbei, wie schade!

W. Latsch

KIU ESTAS *la plej bela ino?*

La idealoj de la viroj tre diferencas unu de la alia — do la ĉi-supra demando estas nur malfacile respondebla

Kie ekzistas la plej belaj virinoj: En Eŭropo — en Sudameriko — en Oceanio? Jam maldetala ĉirkaŭrigardo montras, ke la demando estas absurda. La mondo estas plena je virinoj, kiuj ĉiuj estas gloratoj kiel plej belaj. Estas nur la demando, de kiu. Ne ĉiujn virojn ravas ĉerizecaj lipoj. La Sudana Fulbo deziras la lipojn de sia Venuso bluetaj — lia karulino plenumas ĉi tiun deziron kaj nino, ŝajnas ekzemple al la kavaliroj de la Mamueroj-negroj tute senĉarma. La tataŭas siajn lipojn bluaj. La silkece glata haŭto, plej alta ornamo de la Samoa-ventreto de lia elektitino devas esti malglata kiel lav-raspilo, artefarita ekzem-piero de ornamaj cikatraj ŝvelaĵoj. La bele rondaj membroj de la Vienanino, la voluptaj koksoj de la Andaluzino neniel ekscitas la Japanan eksperton. Lia idealulino havas maldikajn brakojn kaj gambojn.

Multaj Eŭropanoj en Insulindio elektis, en antaŭaj tempoj, Javaninon kiel „domkunulinon", laŭ tiea esprimo. Graciaj estaĵoj, apenaŭ mezaltaj. Delikate bruneta estas la haŭto, briletanta en velureca moleco. Ovala vizaĝeto kun mildaj trajtoj, petole fulmetantaj grandaj malhelaj okuloj, la nazo malgranda, la lipoj arkformaj kaj plenaj, ne dikaj. Perfektaj la rondaĵoj de ŝultroj kaj brakoj. La korpo agrable diketa, manoj kaj piedoj malgrandaj kaj graciartikaj. Ili estus la fiero de grafinoj. Multaj Eŭropanoj trovis iun tagon, ke estas al ili neeble disiĝi de la domkunulino. Pri kelkaj oni diras, ke ili fariĝis feliĉaj restante tie. Kelkaj, kiuj forlasis siajn amatinojn, mortis sen ia videbla kaŭzo. Oni suspektis malrapide efikantan venenon. Aliaj diris, ke ili mortis pro haroj; ĉi tiuj, delikate haketitaj kaj miksitaj en la manĝaĵojn...

En Karaĉio, ĉefurbo de Beluĉistano, mi vidis junulinojn de plej hela blankeco. Sub dikaj harligoj lumis okuloj profunde bluaj de pure Eŭropa formo. Laŭstature ili similis tutege al bonkreskintaj svedinoj. Ili parolis neniun vorton de iu Eŭropa lingvo, eĉ la Hindustana lingvaĵo de la Hindujaj havenoj estis fremda al ili. Oni diris al mi, ke ili venis el montara valo ĉe la piedo de Pamiro kaj estas la sole purrasaj Arjinoj ankoraŭ ekzistantaj. Iliaj riĉaj kostumoj, ilia stranga ornamaĵo kaj la gracieco de iliaj movoj faris ilin malordinare allogaj kaj samtempe fremdaj.

En Basro oni montris al mi Cirkasinojn, pri kiuj oni diris ke turkaj paŝaoj ruinigis sin pro ili. Mi devas konfesi, ke mi kredas tion ebla, de kiam mi vidis ilin. Kaj tie oni montris al mi ankaŭ junulinojn, ĉe kies ekvido efektive ekhaltis mia spiro. Mi tiam estis ankoraŭ tre juna... sed tamen. Neniam mi pensis, ke povas ekzisti tiaj belaj kreaĵoj. Oni diris al mi, ke estas Egiptaj judinoj; mi devis pensi pri la gracilaj „filinoj de Libanono", pri kiuj raportas la Biblio, kaj mi ekkomprenis, kial Jakobo duoble sep jarojn servis pro unu junulino.

En Alĝero laboris en unu el la multaj arĝentejoj vendistino, kiu estis tiel belega, ke ŝi fariĝis vera allogilo por la turistoj. Nobla vizaĝo de plej pura eburo, blue-nigra, ondanta silkeca hararo, okuloj kaj manoj de principino el Mil kaj unu Noktoj, mallarĝa, freŝa buŝo, varma kaj malhele sonora la voĉo: Maŭrino. Kelkaj diris ankaŭ, ke ŝi estas Berberino. En Alĝero, cetere, mi vidis eĉ ankoraŭ pli belan virinon, inon el la tribo de la Tuaregoj. Laudire ŝi estis en la urbo pro negocaj aferoj; inter la Tuareginoj, tiel oni diras, estas multaj, kiuj estas ekterordinaraj negocistinoj. Guste inter la Tuaregoj, mi pensis, inter tiuj kuraĝaj rabistoj de la dezerto! Svelta ŝi estis, de delikatega kresko. Sub ore-blonda hararo brilegis okuloj kiel cejanoj. Vizaĝo kaj manoj estis blankaj kun roza brileto, la mallarĝa buŝo ruĝa kiel koralo.

Aperi pli helaj ol esti: tiu sensenca deziro de multaj „rozoj el la sudo" igis nin ofte blasfemi terure! Kiam ni, en Cilio, venis returne de dancado, nia dekstra jak-refaldaĵo ĉiam estis surŝmirita per dika pudraĵo. Kaj en realo la orkolora haŭto de tiuj knabinoj estas ja unu el ŝiaj distingaĵoj! Strange estas, ke ankaŭ tie blondeco estas opiniata plej alta ĉarmo. Kaj Sudameriko estas riĉa je belaj virinoj, eĉriĉega. Kiu havas la bonŝancon partopreni en „tertulia", en unu el tiuj societaj vesperoj, kiajn aranĝas bonaj familioj al siaj amikoj en siaj hejmoj, tiu estos ravita pro la multeco da ĉarmeallogaj vizaĝoj. La „Limeña" de Peruo, la „Guachinanga" de Meksikio, senmorta per la kanto pri la „Paloma", la „Caraqueña" de Venezuelo... kiu Pariso povus decidi, al kiu estu donata la pomo?

Inter la multaj inter si tre diferencaj triboj de la vastega Oceanio estas nur malmultaj, kies virinoj povas gloriĝi pri vera beleco. Estas Polinezianinoj. Iliaj avantaĝoj estas la grandaj mildaj okuloj komencantaj ekfajrerumi, kiam pasio movas la animon, ilia melodia voĉo, gracia irmaniero kaj mola haŭto. Sed al la plej multaj mankas la talio, se ili estas purrasaj.

Kiu en pli fruaj jaroj, dum la nelonga norda somero, venis ĉe sunsubiro al la maro apud Revalo, fariĝis atestanto de mirinda spektaklo. Tiam la Estoninoj venis al la marbordo, formetis senĝene siajn vestojn kaj enpaŝis la akvon aŭ kuris ludante laŭlonge de la plaĝo, ridante kaj pompante en la brilo de siaj blankaj korpoj. Tie estis eĉ ne unu, kiu ne povus konkuri kun ĉiu belulino transmara.

A. E. Schmidt

Germanaj fervojistoj en Parizo

La malbona Pentekosta vetero ne ĝenis niajn esperantistajn fervojistojn, kiuj pakis la kofron por vojaĝi Parizon je la tago post la festo. Malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj rilate monon kaj vizon baldaŭ ĉio estis en ordo kaj oni nur vidis gajajn vizaĝojn. Jes, Parizo allogis.

En Parizo okazis je la 16a—20a de Majo la 3a kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, fondita en 1948. Merkredon, la 16an de Majo, Parizaj gesamideanoj fervojistaj akceptis nin en la Parizaj stacidomoj kaj gvidis nin per helpo de la „Metro" — ĝi estas la subtera fervojo, la pulso de la aktiveco — al la kongresejo, por ke ni pagu la kotizon kaj ricevu la kongresdokumentojn. Poste ĉiuj rapide iris al la hoteloj por iomete ripozi. La afablaj Parizanoj ĉiam akompanis kaj helpis nin.

Tiel la fervojistoj vidis Montmartre
Foto Müller

Per interkonatiĝa vespero komenciĝis la oficiala programo, kiu estis tre interesa. Ne mankis internacia balo, varietea vespero, fotografado, laborkunsidoj. Tute teknika afero estis la vizito de la lokomotivprovejo de Vitry.

Parizo, kapo de Francio, la plej bela metropolo de Eŭropo, kun siaj ĝentilaj homoj, siaj ĉarmaj virinoj, siaj vidindaj konstruaĵoj estis por ĉiuj partoprenantoj de la kongreso vera travivaĵo. La diversaj manĝaĵoj, la alispecaj kutimoj de la loĝantaro, la granda trafiko, la ĝentileco, ili donis rigardon en la animon de niaj okcidentaj najbaroj.

La aranĝitaj rondvojaĝoj tra Parizo kaj al Versajlo kaj la vizitoj al la eminentaj muzeoj peris impreson de la gigantaj diversaj kulturepokoj. En la mondfama universitato Sorbonne nigruloj, blankuloj kaj flavuloj pace kaj amike laboras kaj studas kaj pruvas per tio, ke rasproblemoj ne ekzistas. Parizo estas tute kosmopolita.

Ankaŭ la postkongresa tago en Epernay kun la vizito de ĉampankeloj fositaj en la kalkaj montetoj estis bone aranĝita.

Ĉiuj germanaj esperantistoj-fervojistoj sentis, ke ili bezonos ĉiujn fortojn por aranĝi la venontan kongreson en Germanio kiel egalvaloran kunvenon.

H. M.

INTERSTENO

Komencante nian Intersteno-kurson, ni deziras al ĉiuj partoprenontoj bonan sukceson kaj petas, ke post ĝia fino ili mallonge konigu al ni en Intersteno siajn spertojn!

I.

1. Vokalsignoj (malsuprenstrekoj): **a, aŭ, aj.** Konsonantsignoj (supren- kaj horizontalstrekoj): **t d ŝ ĵ s z st n c ĉ ĝ.**

La stenografia tabelo dekstre montras la signojn en la „normala pozicio": vokalsignoj finiĝas en la skriblinio, konsonantsignoj finiĝas unu ŝtupon super la skriblinio.

2. Formado de vortoj: la unua signo staras en la normala pozicio; ĉiu sekvanta signo aliĝas al la fino de la antaŭa: dat*), naz, ĵaŭd, ajn, stand aŭd ŝat sat sat stat aĉ naĝ, tas ĉas san ĉast, naŭ saŭc taŭz ŝajn tan.
dan ĉan satan anas stan ananas dand ans danc ŝanc ŝanĝ.

3. **e i ej eŭ:** ten, sid, nest, send.,
eĉ ec etat tez ses dec ĉes ĝen ide sidej zenit niz dis ĝis
dent sens tent sent send cent tend tendenc sentenc.

4. Konsonantsignoj kun „ordinara hoketo": **p b f v r m sp pf:** pan baz fin ven rad
man spec paŭz ben fest vejn rest maj pejzaĝ feŭd maŝin
band vend rand mend vant pens benzin mens manĝ pinĉ.

5. Ordinaraj hoketoj kunfandiĝas kun antaŭa vokalsigno: ap, aŭb, ef, iv, ar, em
sap rab ŝaf rav far aspir najbar fajf sep eben ĉef dev ver vesp
ŝip ĝib cifer river ŝir tim arab ŝerc stern ŝarĝ marĉ anser.

6. **o u oj uj:** od ond oper obe ofer uz ur urn unc urĝ uter.

7. o u oj uj kuniĝas kun antaŭa signo per „banto": do ton roz; su dum nun vund; foj fojn odor bon rond forn anonc respond Eŭrop ĵur ĝust natur funt ŝnur

* La vortoj aperas ĉi tie en formo de r a d i k o j ! La specialajn signojn por la finaĵoj ni lernos pli poste.

I.



Es raschelt weiter! Blick in Esperanto-Zeitschriften

Eine große Anzahl Zeitschriften ist mir seit meinem letzten Bericht über Esperanto-Zeitschriften auf den Tisch geflattert. Und es raschelt weiter und weiter. Wenn man so hineinschaut in die einzelnen Blätter, dann spürt man, daß für unser Esperanto in allen Ecken und an allen Enden der Welt gearbeitet wird. Dabei kommen mir viele, viele Gedanken. Einer davon ist fast vermessen: Wenn man diese weitverzweigte Kleinarbeit und die vielen kleinen und großen Summen an Geld vereinigen könnte, um dem Weltsprache-Gedanken mehr Wucht und Schwung geben zu können! Aber gleich hinterher muß ich diesen Gedanken verwerfen. Bei dem Durcheinander, bei dem Rüstungsfieber, bei den Herrscher-Gelüsten hie Ost — hie West, sind die Möglichkeiten einer Arbeitsvereinigung für Esperanto fast null. Es bleibt halt wieder beim alten: Jeder einzelne muß eifrig weiterarbeiten. Und nun will ich an die Zeitschriften gehen.

Heute sollen die Verbandsblätter an der Spitze stehen. Da kommt mir als erste die **Svisa Espero** in die Hand. (Die Reihenfolge ist kein Maßstab!) Sie sieht äußerlich ansehnlich aus. Ein Umschlag in Buchdruck, jede Nummer mit einem Bild aus der schönen Schweizer Landschaft. Der Text ist mit der Schreibmaschine geschrieben und in einer Art Offsetdruck hergestellt. Erstaunlich sind die vielen Anzeigen auf dem Umschlag, die sicherlich die Finanzierung der Zeitschrift ermöglichen. Der Inhalt ist ganz in Esperanto und umfaßt Nachrichten aller Art.

Nicht so groß und einfacher sieht das **„Boletín"** der Federació Esperantista Española aus. Trotzdem ist es in seinem Inhalt sehr lebhaft und abwechslungsreich. Für mich ist die Zeitschriftenschau in jedem Heft ein Genuß. Sie gibt den spanischen Samideanoj einen glänzenden Überblick über die Esperanto-Presse. Auch unsere Esperanto-Post wurde schon oft lobend erwähnt. Dankon, karaj samideanoj en Hispanujo. —

Selten erreicht uns **Esperanto Finnlanda,** und es kommt mir vor, als ob die Zeitschrift aus einem verlorenen Land käme. Und wir wundern und wir freuen uns, den altbekannten Namen Vilho Setälä noch immer zu lesen. Der alte „Aktivist" ist also noch voll tätig. Die Zeitschrift enthält viel finnischen Text, und die Dezember-Nummer befaßt sich hauptsächlich mit den Konsum-Vereinen. Es ist aber verständlich, wenn man liest, daß diese Konsumvereine die Zeitschrift unterstützen.

Von Finnland machen wir einen Sprung nach Holland. Von dort erreichte uns der **Nederlanda Esperantisto** im Format des Heroldo, der in vorzüglicher Weise seine Abonnenten von allem unterrichtet, was sich in der Esperanto-Bewegung tut. Sehr abwechslungsreich!

Auf der ersten Seite des **„Franca Esperantisto"** prangt die Übersetzung von Gustav Flauberts „Salambo". La „Union Espérantiste Française" verspricht, wenn sich genügend Interessenten melden, daß in irgendeiner Form eine schöne Auswahl von Werken der französischen Literatur erscheinen wird, besonders aus der klassischen. „Salambo" sei eine Kostprobe dafür. Sonst ist das Blatt sehr lebhaft, und man freut sich über die altbekannten Namen französischer Esperantisten. Seit Januar 1951 wurde das Format um die Hälfte verkleinert. Wie kommt das? Andere — bedeutende — Esperanto-Zeitschriften taten dasselbe.

Und jetzt schauen wir kurz in unsere deutsche Heimat. Im Januar wurde hier ein neues Zeitschriftenkind geboren: **„La Stelo",** das Esperanto-Informilo de Sudvirtembergo kaj Sudbadenio. Vier Seiten im Format DIN A 4. Wenn man die Seite Anzeigen sieht, kann man verstehen, wieso bei den heutigen Druckpreisen so ein Blatt erscheinen kann. Es wird sicherlich dazu beitragen, die Verbindung unter den Esperantisten des deutschen Südens zu festigen. Eigentlich müßte dies die Aufgabe der GEA-Zeitschrift „La Ponto" sein... Wie schwer jeder Anfang ist, sieht man daran, daß die Esperanto-Überzeichen in der Druckerei nicht vorhanden sind. Aber sie sind angekündigt. Guten Erfolg!

Ein Genuß ist es, als Buchdrucker die aus Stockholm kommende Zeitschrift **„Arbetar Esperantisten"** in die Hand zu nehmen. Nicht nur wegen des für uns luxuriösen Kunstdruckpapiers, sondern wegen der sehr gut ausgewählten Titelbilder und des sauberen Drucks mit Illustrationen. Aber das sind nicht alle Vorzüge: Das Esperanto ist einwandfrei und damit auch der Inhalt. Zum Beispiel die Nr. 7 in 1950 enthält einen guten Artikel „Vizito en la ruinurbo Kolonjo" de Johannson, der die Stadt am Rhein in ihrem heutigen Zustand schildert und in dem den Kolonjaj Tramistoj hohes Lob gezollt wird. 16 Seiten Umfang mit Umschlag in DIN A 5. Eine wirkliche Zeitschrift in unserem Sinne!

Schon im 22. Jahr erscheint das **„Interligilo",** das offizielle Organ für Post, Televerbindungen und Transport. Er-

staunlich ist diese Ausdauer! Und der Inhalt — ganz in Esperanto — dürfte hochinteressant sein für alle Fachleute auf diesen Gebieten. Die Dezember-Nummer enthält einen aufschlußreichen Artikel über die Eisenbahn in — Korea. Wer liest dies nicht? Die Briefmarkensammler finden eine Unmenge an Neuigkeiten im „Interligilo".

Nachdem „Literatura Mondo" verschwunden ist, muß ich für eine andere literarische Zeitschrift eine Lanze brechen. Es ist für die **„Malgranda Revuo"**, herausgegeben von Stellan Engholm, dem weltbekannten schwedischen Schriftsteller in Esperanto. Die Zeitschrift kann nicht mehr bestehen, wenn nicht eine größere Anzahl neuer Bezieher hinzukommt. Sie ist sicherlich unterstützenswert, denn sie hält ihre Seiten offen für alle Meinungen. Der Kommunist kommt genau so zu Wort wie der Demokrat — der Religiöse wie der Atheist! — Weshalb kann eine solche Zeitschrift nicht bestehen? Die Gleichgültigkeit der Samideanoj ist nicht schuld, sondern die Verwirrung auf allen Gebieten in der Welt! Nirgendwohin kann man Geld ins Ausland schicken; die Grenzen sind zu; die Welt ist in zwei Parteien geteilt — und so lange dieser Zustand besteht, wird es nicht leichter werden für — Esperanto-Zeitschriften. Interessenten sei noch gesagt, daß die „Malgranda Revuo" beim Siegfried - Ziegler - Verlag in München-Pasing bestellt werden kann. Preis: 3 respondkuponoj je Nummer.

Maks Federl

Demandu — mi respondos

En kunvenoj de esperantistoj ofte mankas taskoj kaj temoj, kiuj prezentas eblojn por gaja kaj samtempe instrua konversacio. En novjara societo de najbaroj mi partoprenis, en germana lingvo, demandorespondan ludon, kiu bone konvenas al la dirita celo kaj kiun mi jen komunikas al vi en Esperanto:

Sur malgrandajn biletojn oni skribu po unu el la sekvantaj demandoj kaj respondoj:

Ĉu vi sidas volonte apud mi?
Ĉu vi estas enamiĝinta?
Ĉu vi havas vastan koron?
Ĉu vi pensas ofte pri mi?
Ĉu vi emas flatadi?
Ĉu vi emas am-okulumi?
Ĉu vi havas korĉagrenon?
Ĉu vi interesiĝas pri mi?
Ĉu vi ofte ŝanceliĝas?
Ĉu vi ofte revas pri mi?
Ĉu vi trovas min beleta?
Ĉu vi estas rafinita?
Ĉu via amo estas kore respondata?
Ĉu vi trovas min aminda?
Ĉu vi ofte rendevuas?
Ĉu vi estas ĵaluza?
Ĉu vi bonvolus akompani min [hejmen?
Ĉu vi amas vin?
Ĉu vi ricevis jam multajn [amleterojn?
Ĉu vi ŝatas min vidi?
Ĉu vi falis jam unu fojon el la lito?
Ĉu vi ŝatas promeni en la arbaro?
Ĉu vi havas multe da mono?
Ĉu vi volas plenumi miajn dezirojn?
Ĉu mi rajtas esti baptopatr(in)o ĉe viaj unuaj dunaskitoj?
Ĉu vi estas karesema?
Ĉu vi ŝatas esti akompanata?
Ĉu vi opinias min stulta?
Ĉu oni multe amindumas vin?
Ĉu vi ŝatas promeni dum lunlumo?
Ĉu vi deziras min revidi?
Ĉu via koro estas ankoraŭ libera?
Ĉu vi volas fordonaci vian koron?
Ĉu vi estas baldaŭ edz(in)iĝonta?
Ĉu vi deziras havi kison de mi?

*

En via kapo mankas klapo.
Tute ne!
Sŝ, ne parolu pri tio!
Tio estus laŭ via plaĉo, ĉu?
Ho, se vi scius!
Tutajn horojn.
Tio ofte okazas.
Se vi tion deziras...
Mi ne scias, kion mi farus pli volonte.
Kun pli kaj pli kreskanta entuziasmo.
Sajnas ke vi travidas mian koron.
Vi ja povas provi.
Ne, sed vi!
Ne malutilus.
Prefere ne demandu!
Ĉu vi estas freneza?
Tio povus esti danĝera!
Ju pli longe, des pli bone!
Je kelka tempo.
Nur lundon matene.
Nu, vi estas ja scivolema!
Kio ne estas, povos ankoraŭ fariĝi.
Se ne okazos malhelpo.
Nur se mi estas sola kun vi.
Ho jes.
Se tio plezurigas vin.
Kompreneble.
Ne estu malsaĝa!
Mi ne traktas pri bagateloj.
Tutkore.
Tiam kaj tiam.
Pri tio oni ne parolas.
Rulitan haringon mi pli ŝatus!
Pri tio vi dubas?
Vi pensas ke mi agas kiel vi mem!

Pretiginte kartetojn (preferindaj al simplaj paperslipoj) kun tiuj demandoj kaj respondoj unuflanke, skribu dorsflanke „Respondo" resp. „Demando" kaj metu la du arojn sur la tablon tiel, ke estu videblaj nur la dorsflankoj kun „Demando" kaj „Respondo". Kaj jam povas komenciĝi la ludo.

Iu el la societo ekprenas karteton demandan kaj faras la koncernan demandon, al kiu li volas. La demandito prenas nun respondan karteton kaj legas la respondon. Poste li prenas siavice denove demandan karteton kaj elektas alian respondonton ktp. Laŭsperte la ludo havigas al ĉiuj grandan plezuron. JB.

Dekalogo por hejmlandanoj

1. **Klopodu paroli bone la lingvon, ĉar la impreso, kiun fremda samideano kunportas el via lando, dependas ankaŭ de tio, kiel vi parolas.**
2. **Kiam fremdlandano anoncas sian viziton, pripensu, kion interesan vi povos aranĝi aŭ montri al li.**
3. **Alkonduku lin al via hejmo por montri al viaj skeptikaj familianoj la uzon de Esperanto, kaj profitu la okazon por paroligi ankaŭ vian edzinon aŭ fraton, ĝenerale timeman.**
4. **Ne tro ĉirkaŭsaltu lin. Estu antaŭ li amika sed natura.**
5. **Ne fanfaronu antaŭ li pri la bonaj ecoj de via nacio, ĉar tio povus malbone impresi lin kaj fariĝi ridinda.**
6. **Helpu en la zorga preparo de la kursoj kaj prelegoj de eksterlanda samideano, ĉar tio povas favori vian lokan kaj landan movadon.**
7. **Eksterlandano povas alporti al la movado novajn spertojn. Akceptu lin en la grupo aŭ landa asocio.**
8. **Neniu estas profeto en sia lando. Pro tio, eksterlandano iafoje povas esti tre efike uzata, precipe por la propagando.**
9. **Ni ĉiuj vivas en la sama lando: Esperantujo. Pro tio ni ne sentu nin ĝenataj, se eksterlanda kapabla samideano plenumas taskon ĉe ni.**
10. **Jam de la momento, kiam eksterlandano kunlaboras kun la lokaj esperantistoj, tiuj ĉi forgesu lian devenon kaj klopodu ne envii liajn sukcesojn, ĉar tio povus endanĝerigi la movadon.**

Tibor Sekely (ESPERANTO 541)

Dekalogo por fremdaj Esperantistoj

1. **Antaŭ ol ekvojaĝi kiel esperantisto, klopodu plibonigi vian lingvan kapablon, ĉar vi reprezentos ne nur vin mem, sed ankaŭ la landon, al kiu vi apartenas.**
2. **Anoncu vian alvenon kun la horo, ĉar improvizaĵoj kutime malsukcesas, eĉ rilate al gastamo.**
3. **Nepre uzu Esperanton en la eksterlando antaŭ ol klopodi en la nacia lingvo.**
4. **Ne atendu, ke vi estos s t e l o en la fremda lando, sed egalrajta amiko.**
5. **Ne sentigu al la hejmlandanoj ian superecon vian aŭ de via nacio.**
6. **Se vi intencas fari kursojn aŭ prelegojn, interkonsentu jam antaŭe kaj sufiĉe frue kun la lokaj esperantistoj.**
7. **Se via vizito estos daŭra, klopodu trovi vian lokon en la loka aŭ landa movado kaj kunlaboru tie, kie via laboro estos plej efika kaj plej utila.**
8. **Ian eventualan laboron faru serioze kaj konscience, kvazaŭ vi farus ĝin en via propra lando. Esperantistoj estu ĉie hejme!**
9. **Vi eĉ povas plenumi gvidan taskon en la loka aŭ landa movado. Sed ne lasu vin honorigi per reprezentaj titoloj.**
10. **Por plenumi gravan taskon almenaŭ du jaroj estas necesaj.**

Tibor Sekely (ESPERANTO 541)

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

anbändeln (mit jemand) serĉi kontakton, ekflirti
Armaturenbrett (Auto) instrumenta tabulo
Brettl kabaredo
Drehbuch (Film) tekstlibro, scen-
einblenden (Rundfunk) scenŝanĝi, enmiksi
einmotten ŝirmi (sekurigi) kontraŭ tineoj
einnebeln nebulumi
Erreger (Krankheits-) mikrobo
Fahrtenbuch (Jugendgruppen) migradlibro
Faltboot faldkanoto
Feinmechaniker preciz-mekanikisto
Fernverkehrsstraße granddistanca strato, ŝoseo
fesch ŝika
Fingerabdruck fingra premsigno, fingrokopio
Freilbad liberaera naĝejo. **~lichtbühne** liberaera scenejo
Funkorgel, kino-, koncertorgeno
Hallenbad halnaĝejo
Kaltschale malvarmsupo
Klapp|kamera balgokamero. **~stuhl** faldseĝo
Kleinkunst kabareda arto. **~bühne** kabareda teatro
Kriegsschauplatz militejo, fronto
lagern kampi. **Lager** kampejo
Laufkundschaft klientaro el pasantoj
Lieferwagen liveraŭto
Luftlandetruppen paraŝutaj trupoj
maschenfest solidmaŝa
Maskottchen talismaneto, pupeto
Mop polurbalailo
Musiktruhe gramofon(radio)ŝranko
neuwertig kvazaŭnova
Nutzleistung (techn.) utila potenco
Panzer|schrank kirasŝranko. **~wagen** tanko
paritätisch egalparta
Plattenschrank sondiska ŝrank(et)o
schlanke Linie svelta formo, figuro
Schwachstrom = **Niederspannung** malalta tensio
Stammkundschaft daŭra, regula klientaro
Starkstrom = **Hochspannung** alta tensio
überblenden (im Film) scenŝanĝi, transiri
Überlandleitung granddistanca kondukilo
Unterwelt (einer Stadt) krimula mondo, krimularo
Vergaser karburilo
Wipproller mekanika skutilo
Wohnwagen loĝveturilo
zelten tendi. **Zeltlager** tendaro

Hans Wingen

Eigenschaftswörter aus Zeitwörtern

Wenn die Endung **-a** Zeitwortstämmen angefügt wird, entstehen Scheineigenschaftswörter, z. B. **susura** und **memstara.** Dicht daneben liegt die Mittelwortform auf **-anta.** Mit **-anta** bezeichnet man eine handelnde Person oder Sache, wohingegen die Form auf **-a** das Ergebnis einer Tätigkeit ausdrückt, z. B. **la susura bruo;** nicht **susuranta,** denn nicht das Geräusch raschelt, sondern eine Person oder Sache. Im Deutschen macht man diesen Unterschied nicht, z. B. das raschelnde Geräusch, sagt aber gewöhnlich: das Rasselgeräusch. Ein **memstaranta infano** (von selbst stehendes Kind) braucht viele Jahre, bis aus ihm ein **memstara komercisto** (selbständiger Kaufmann) geworden ist.

Das wäre an sich sehr einfach, wenn es keine Esperanto-Wortstämme gäbe, die nach internationalem Sprachgebrauch den Charakter von Eigenschaftswörtern haben, von Dr. Zamenhof aber im Universala Vortaro als Zeitwortstämme aufgeführt wurden; darunter z. B. **fiksi** und **korekti,** wo man **fiksa** und **korekta** erwartet hätte. Durch Anhängen von **-a** an solche Stämme entstehen aber reine Eigenschaftswörter, z. B. **fiksa** und **korekta.** Nun ergibt sich folgendes Bild: Nimmt man den ursprünglichen U. V.-Stamm **fiks(i)** = befestigen und hängt **-igi** an, so ergibt das **fiksigi** = befestigen lassen, ein Befestigen veranlassen. Hängt man aber **-igi** an das von **fiksi** abgeleitete **fiksa,** so ergibt das **fiksigi** (fiksa-igi) = festmachen. Es kann also folgender durchaus richtige Satz gebildet werden: **Li fiksis la bildon sur la muro, sed li ne fiksigis la bildon, ĉar ĝi terenfalis post kelkaj minutoj.** Man kann natürlich auch **igis ĝin fiksa"** schreiben, wodurch jedes Mißverständnis ausgeschaltet wird. Ein ähnlicher Satz ließe sich mit **korekta** bilden.

M. Butin

LINGVA KONSULTEJO

Mi kiomas . . .

Dem Artikel in EP 3/1951 S. 34: **Mi kiomas, mi kiamas** ktp. kann ich in keiner Weise zustimmen. Er stellt m. E. die Spitze dessen dar, was man mit Verschandelung einer Sprache bezeichnet. Wenn unser Meister das lesen würde, er würde sich im Grabe nicht nur umdrehen, sondern rotieren.

Obwohl die Redaktion in der Anmerkung zum Ausdruck bringt, daß sie sich nicht unbedingt diese Auffassung einer sprachlichen Weiterentwicklung zueigen macht, halte ich doch die Diskussion solcher futuristischen Gedankengänge in einer Zeitschrift, die ihrem Aufbau nach auch die Anfänger erfassen will, für überaus gefährlich, weil damit in sprachlich nicht genügend Gefestigte Verwirrung getragen wird. Entweder machen sie sich diese Gedankengänge zu eigen und verderben damit ihre Sprache, da sie den Unsinn noch nicht genügend beurteilen können, oder, falls sie zum sprachlichen Urteil schon befähigt sind, kommen sie zu dem Schluß, daß die Entwicklung der Sprache letztlich in Unlogik endet, es also keinen Wert hat, sich weiter damit zu beschäftigen.

Auch für den sprachlich Geschulten ist die Weiterentwicklung dieser Gedanken nicht ratsam. Sie führt aus der Klarheit und Logik der Sprache heraus. Man kann hier nur sagen: warum einfach, wenn es auch umständlicher geht!

Warum **kiomas,** wenn das Wort **demandas** denselben Zweck erfüllt! (Nebenbei gesagt, erfüllt das Beispiel mit kiomas noch nicht mal den Zweck, Kurzform zu sein, es ist genau so lang wie die Normalform.) Mit den anderen Tabellenwörtern ist es das gleiche. Das Beispiel **okas** — es ist acht, ist immerhin noch erträglich, obwohl nicht gerade schön. Es läßt sich eben nicht alles allgemein anwenden. Die Freiheit der beliebigen Anwendung der Regeln in Esperanto findet ihre Begrenzung in der Forderung nach Klarheit, eine Forderung, die auch vom Meister als oberste aufgestellt wurde. Bei den angeregten sogenannten Kurzformen ist sie nicht mehr gegeben.

Ich schätze s-anon Dellian wegen seiner Arbeiten auf anderem Gebiet, insbesondere der Schaffung fachwissenschaftlicher Wörterbücher; in diesem Fall aber ist seine Phantasie entschieden mit ihm durchgegangen.

Bernhard Zenker

Demando 16

Pri „lia" kaj „sia"

Mi trovis la sekvantajn frazojn:

1. a) Leonoj kaj leopardoj nutras i l i a j n idojn;
   b) korvoj manĝigas kadavrojn al i l i a j infanoj. (La pronomoj rilatas al la substantivoj.)
2. Mi vidis la kuracistojn kun s i a j blankaj kiteloj.
3. Ni vizitis la astronomon apud s i a teleskopo. (La pronomoj rilatas al la komplementoj.)
   Ĉu tiuj tri frazoj estas korektaj?
4. Ĉu korekta estas la frazo: U n u l i a g a m b o estis difektita?

Ernst Möller

Respondo 16

1. a) Devas esti: siajn. Por
   b) mi preferas tute alian frazokonstruon: La korvoj igas siajn infanojn manĝi kadavrojn.
2. kaj
3. estas ĝustaj: s i a ĉi tie signifas s i a p r o p r a, kaj la kiteloj estas k u t i m a j a p a r t e n a ĵ o j de la kuracistoj, intime ligitaj al ili; same la teleskopo de la astronomo. En tiu kazo oni povas uzi s i a, ankaŭ se ĝi ne rilatas al la subjekto!
4. Korekta, kvankam oni ne tre ofte trovas tiun konstruon. Oni povas klarigi ĝin jene: La vortojn m i a, v i a ktp. oni ĉiam povas anstataŭigi per d e m i, d e v i: lia gambo = la gambo de li. Do ankaŭ: unu gambo de li = unu lia gambo. Sed pli ofta estas la esprimmaniero „unu el liaj gamboj".

Hans Wingen

Auf dem Büchertisch

Einzeln eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Ein kurzes Wort an alle, die Esperanto-Druckwerke herausgeben und zur Besprechung versenden.

Viele Esperanto-Zeitungen und Zeitschriften enthalten in ihrer Rezensions-Ecke einen Hinweis, der besagt, daß nur doppelt eingesandte Bücher, Broschüren usw. besprochen, einfache dagegen nur erwähnt werden. Auch bei EP ist dies der Fall. Tatsache aber ist, daß heute kaum noch etwas in zwei Stücken ankommt. Das war vor dem Krieg noch ganz anders; es war selbstverständlich, daß man ein Buch in zwei Stücken sandte, wenn man eine Rezension erwartete. Das hatte auch seinen guten Grund. Ein Stück verblieb der Redaktion für Bibliothek oder Archiv, das andere erhielt der Rezensent. Heute zwingen die Einsender die Redaktionen, alles selbst zu rezensieren, weil ein Belegstück für die redaktionelle Tätigkeit fast immer nötig ist. Das bringt mit sich, daß Besprechungen oft lange hinausgeschoben werden müssen, bei größerem Eingang naturgemäß knapp ausfallen und schließlich stets unter dem Blickwinkel der Redaktion erfolgen.

Bei der Redaktion der EP sind bisher nur von einem einzigen Verlag, nämlich Heroldo de Esperanto, Besprechungsstücke doppelt eingegangen. Alle andern glaubten wohl, daß ein Stück schon mehr als genug sei. Da man einen alten guten und auch heute noch sehr nötigen Brauch nicht ohne Not verlassen soll, wird die EP sich von nun an streng daran halten, daß nur doppelt eingehende Stücke besprochen werden. Bei einfach eingehenden wird angenommen, daß eine kurze Erwähnung genügt.

Verlag und Redaktion.

Nemulto da vortoj al ĉiuj, kiuj eldonadas Esperantajn presverkojn kaj dissendas ilin por recenzo.

Multaj Esperanto-gazetoj kaj revuoj enhavas en sia recenz-angulo indikon dirantan, ke duope alvenintaj libroj, broŝuroj ktp. estas recenzataj, sed unuopaj nur menciataj. Ankaŭ EP faras tion. Sed fakto estas, ke nuntempe apenaŭ io alvenas duope. Antaŭ la milito tio estis ankoraŭ tute malsama; estis memkompreneble, ke oni sendis du ekzemplerojn de libro, se oni atendis recenzon. Tio havis bonan kaŭzon. Unu ekzemplero restis ĉe la redakcio por biblioteko aŭ arkivo, la alian ricevis la recenzinto. Nun la sendintoj devigas la redakciojn ĉion mem recenzi, ĉar por la redakcia laboro unu pruvekzemplero preskaŭ ĉiam estas nepra. Tio sekvigas, ke recenzoj ofte estas prokrastataj, ĉe multa eniro la recenzoj estas nur koncize farataj kaj, fine, ĉiam estas verkataj sole el la vidpunkto de la redakcio.

Nur tre malmultaj redakcioj, unualoke Heroldo de Esperanto, sendas recenzotajojn duope. Ĉiuj aliaj ŝajnas kredi, ke unu ekzemplero estas jam pli ol sufiĉa. Sed oni ne forlasu malnovan bonan kaj ankoraŭ hodiaŭ necesan kutimon sendevige; do EP de nun nur recenzos duope alvenintajn ekzemplerojn. Ĉe unuopaj ĝi supozos, ke mallonga mencio sufiĉas.

Eldonejo kaj Redakcio

Krucvort-enigmo

Horizontale: 1. Apliki forton, pezon, 4. nitrogeno, 7. grava parto de veturilo *), 8. oni metas ĝin en la teron *), 10. ĉefa azia nutraĵo *), 11. rondkorpa, 13. sudlanda arbofrukto, 15. esti skuetata *), 16. iom granda aro da domoj, 18. bestaro de iu regiono (u = ŭ) *), 19. iama loĝanto de la sudadriatikaj marbordoj, 20. armilo *), 22. kio povas esti, 24. aldifino, asigno, 28. religia movado japana *), 29. nedifina tabelvorto, 30. kulturebla kampo *), 31. afrika riverego *), 32. unu el la plej oftaj verboj *), 33. aliigi, 34. terkolo.

Vertikale: 1. Reprodukti per metalaj literoj *), 2. rodulo *), 3. religi-sistemo *), 4. du kune (u = ŭ), 5. infekta malsano *), 6. stato de oksigeno *), 9. poezia vorto por eterneco *), 11. ruĝa juvelŝtono, 12. emblemo de metio *), 13. ara, kuna, 14. antikva greka monereto, 15. trinkilo *), 17. part(et)o, 21. perei en akvo, 22. nomo de princidino en „Don Carlos", 23. bati grenon, 25. tre konata germana purigilo, 26. rapida formovo tra l' aero, 27. kolosa, 29. sufikso, 32. sufikso.

H. W.

*) Radiko

Solvo de la enigmoj el n-ro 6

SILAB-ENIGMO

barKo — batIsto — ErmEno — polEkso — preSbitero — tesTamento — ornAto — priSmo — parGeto — sakArino — sieSto — konTinento — ferDeko — genEzo — dorSo — liuTo — manAo — farSo — marDo — indIgo — MezOpotamio = KIE ESTAS GASTO ESTAS DIO.

Vizitkart-enigmo

Sam-anino Edina Morzo (Romo) estas en e d z i n a stato.

Kleiner Nothelfer für Esperanto-Lernende. 8-seitiges Faltblatt aus Karton im Format 21 × 14 cm. Herausgegeben von der Schwarzwälder Tagblatt G. m. b. H., in Villingen (Schwarzwald). Preis —.40 DM (starker Karton) und —.35 DM (dünner Karton).

„Dieser kleine Nothelfer ist weder ein Lehrbuch, noch ein Ersatz eines solchen. Er soll . . . während der Unterrichts- oder Übungsstunde ständig neben dem Lehrbuch vor dem Lernenden liegen". So stellt der Verfasser Fr. Pommerencke sein neues Hilfsmittel vor. Seine 8 Seiten enthalten die Fundamenta Gramatiko, die Wortbildungssilben und — als Neuheit — auf zwei Seiten je ein Wörterverzeichnis Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch über die wichtigsten Bindewörter, Empfindungswörter, Fürwörter, Umstandswörter und Verhältniswörter, die bekanntlich beim Lernen nicht sehr beliebt sind und auch schnell vergessen werden. Hier sind sie schön zusammengestellt und können schnell einzeln gefunden werden. Dieses Verzeichnis ist also ein richtiger „Helfer in der Not". Eine weitere Seite nehmen die Zahlen und die „Zeit" ein, ebenfalls eine willkommene Zusammenstellung.

Was ich mit Entschiedenheit ablehne, ist die Behauptung, daß „eü" in der Aussprache dem „eu" in „heute" entspricht. „Heute" würde in Esperanto = hojte geschrieben, und das ist doch wohl etwas anderes.

Im übrigen scheint mir der Kleine Nothelfer ein brauchbares Hilfsmittel für Übung und Unterricht zu sein. Jfb.

Munkeno salutas vin. Faltprospekt 20×21 cm, 16 Seiten. Feines Kunstdruckpapier, Dreifarbendruck mit vielen künstlerischen Bildern und Photographien. Preis nicht angezeigt.

Ein der Stadt München wirklich würdiger Prospekt, eine Visitenkarte für den 36-a Universalen Esperanto-Kongreß, wie man sie sich kaum besser und eindrucksvoller hätte vorstellen können. In der geschmackvollsten Weise sind Text und Bilder einander angepaßt. Das Blau und Weiß — die bayerischen Farben — bringen uns auf jeder Seite den besonderen Charakter der Stadt zum Bewußtsein. Die dargestellten Kostbarkeiten aus den verschiedensten Gebieten der Kunst zeigen uns, wie reich diese Stadt des diesjährigen Esperanto-Kongresses tatsächlich ist und wie viel sie uns zu bieten vermag.

„Gotiko kaj renesanco, barok-rokoko kaj klasikismo, Munkena karnavalo, bierkeloj, festprezentaĵoj, Oktobra festo, zoologia, botanika ĝardenoj, flughaveno, rava ĉirkaŭaĵo" all das zeigt uns in Wort und Bild dieser großartige Führer durch München, der auf seiner letzten Seite noch einen klaren topographischen Überblick über alle Sehenswürdigkeiten vermittelt. Den Text übersetzte unser Bundespräsident selbst, und das verbürgt uns nicht nur dessen Richtigkeit, sondern gibt uns den Genuß eines eleganten Esperanto.

Solcher Städteführer könnten wir wirklich noch eine Unmenge brauchen. Jfb.

Köln. 4seitiger Faltprospekt auf Kunstdruckpapier im Format 10×21 cm. Herausgeber: Verkehrsamt der Stadt Köln, Domkloster 3.

Gerade habe ich den Münchener Prospekt aus der Hand gelegt, da liegt bereits ein weiterer vor mir, allerdings durchaus nicht so pompös, so luxuriös wie der aus der Stadt des 36. Esperanto-Weltkongresses. Schon im Umfang ist er bescheiden, in der Ausstattung ebenso, und doch, er ist durchaus ein würdiger Bruder seines Münchener Vorgängers. Die Vorderseite ziert die Silhouette des deutschen Doms am Rhein, zu seinen Füßen fließt der deutsche Strom vorbei, und fröhliche Menschen sitzen unter farbigen Sonnendächern. Und auf der Rückseite ragt ein anderes Wahrzeichen der Domstadt empor, der Presseturm in den Messehallen; davor liegt ein schmuckes, großes Rheinschiff und im Vordergrund ein schnelles Verkehrsboot mit dem Namen „Henry Ford II", womit auch schon die Verbundenheit der Stadt mit einem der größten Industriezweige, die darin vertreten sind, zum Ausdruck kommt.

Der Text in einwandfreiem Esperanto gibt uns einen schnellen Überblick über Köln von Anbeginn bis jetzt, einem kurzen, aber sehr eindrucksvollen Kulturfilm vergleichbar.

ŜERCOJ

La moderna arto

En galerio de pentraĵoj de Bostono oni ekspoziciis 35 bildojn faritajn de spiritmalsanuloj el la tiea urba malsanulejo. Inter la 35 pentraĵoj troviĝis unu de famkonata matematikprofesoro de la teknika instituto. La publika demando, po kies ĝusta respondo oni fiksis premiojn, tekstis: Kiu bildo estas tiu de la profesoro?

Kelkaj hazarde divenis la ĝustan.

La Kolonjano „Tünnes"

iam vizitis kunvenon kaj estis petata, diri kelkajn pli-malpli konvenajn vortojn al la kunvenintoj. Sed li, ordinare tiel parolema, ĉirkaŭrigardas helpon petante kaj ne scias, kion diri.

Tial, unu el la aŭskultantoj krias ĝoj-malice: „Jen, jen, tiel estas; kutime vi ĉiam havas la plej grandan buŝon; sed nun vi vidas, ke ĝi estas tamen tro malgranda."

„Jes, vi estas prava", respondis rapide Tünnes, „parolu vi!"

Kiel eble plej rapide aperos post la kongrestagoj

la 16-paĝa Kongres-numero de EP

Aperis en libroformo

La Nekonatino

Novelo de R. C. Muschler

La germana eldono aperis en nombro de 200000 ekzempleroj. Tradukoj en angla, dana, finna, hungara, itala, nederlanda, sveda kaj norvega lingvoj. Prezo: broŝurita eldono 2,— DM, bindita 3,— DM. Bona kongres-donaco! Mendu ĉe via librejo aŭ rekte ĉe la Esperanto-Fako de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg, Germ.

Havebla ĉe la Kongresa Librejo!

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Por eksterlandaj samideanoj en München dum la 36-a Universala Kongreso utilas

Esperanto in der Tasche

Lingva gvidlibro kun multaj praktikaj paroltumoj en germana kaj Esperanta lingvoj. Kun aldono: Prononco de germanaj vortoj. Prezo: 1.60 DM

Aĉetebla ĉe la Kongresa Librejo

Der Einsprachler

im Esperanto-Lehrgang muß **üben,** recht viel üben, damit ihm Wörter und Regeln in Fleisch und Blut übergehen.

Der Fremdsprachler im Esperanto-Lehrgang muß . . . auch üben, damit er über manches, was ihm schon bekannt ist, nicht hinweghuscht. Überhaupt muß jeder, der fließend sprechen will, üben. Das ist einfach eine Erfahrungstatsache.

Viel Übungsstoff enthält darum unser Lehrbuch

„Wir lernen Esperanto".

Benutzen Sie es, wenn Sie es noch nicht kennen sollten, einmal in Ihrem nächsten Lehrgang. Sie werden über seine klaren Regeln und Beispiele genau so erfreut sein wie über seinen reichhaltigen und praktischen Übungsstoff.

Es kostet 2,- DM zuzüglich 10% für Porto und Verpackung, Schlüssel dazu 80 Pf zuzüglich 10% für Porto.

Limburger Vereinsdruckerei GmbH. / Limburg/Lahn

Venu al la Esperanto-Postkongreso en Nürnberg/Germanujo

11-a kaj 12-a de aŭgusto 1951.

Programo:

Sabaton, la 11an de aŭgusto 1951:
14.35 Forveturo per trajno el München
17.40 Alveno en Nürnberg. Akceptado de la gastoj
20.00 Postkongresa Festvespero

Dimanĉon, la 12an de aŭgusto 1951:
10.00 Gvidadoj tra la urbo. Vizitado al la kastelo, la muzeoj kaj preĝejoj
13.00 Tagmanĝo
15.00 Vizitado al la zoologia parko de Nürnberg, la plej bela de Germanujo
Vizitado al la Agrikultura Ekspozicio en la najbara urbo Fürth

Kotizoj: 5.— GM; por edz(in)o de kongresano aŭ junul(in)o malpliaĝa ol 20 jaroj 2,50 GM

Tranoktado en hoteloj de 4,50 GM ĝis 12,— GM, en privataj ĉambroj ekde 3,50 GM, en junularaj restadejoj 0,50 GM ĝis 1,— GM

Aliĝoj al Esperanto-Grupo, Nürnberg, Mögeldorfer Hauptstr. 2

Wir zeigen Ihnen

als Beilage in dieser Nummer unser neues Flugblatt, das Sie überall dort verwenden können, wo Skepsis und Esperanto-Gegner vorherrschen. Deshalb bestellen Sie vor der Werbung für einen neuen Kursus das Flugblatt

„Gegen Esperanto?"

Alle Einwände gegen Esperanto werden stichhaltig widerlegt. Bis 1000 Stück kostet es 5 Pfennig, über 1000 Stück 4 Pfennig.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH. · Limburg/Lahn · Germ.